REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 4 (41) aŭgusto 2007*



en la numero

rakontoj kaj impresoj pri RA-5, VsPLESk-3, BET-43
kies poeto estis Eroŝenko?
ĉu ni bezonas REK?
Paŭlo Moĵajev – nova redaktoro de "Kontakto"
Probal Daŝgupto estas elektita kiel nova Prezidanto de UEA
novaj versaĵoj de Mikaelo Bronŝtejn
gratulo por Jefim Zajdman
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2007

enhavo:

01 La suna RA, Renkontiĝo de Amikoj
03 "Problemojn forgesi ..."
04 La impresoj kaj pensoj post du ĉi-jaraj regionaj renkontiĝoj
06 Versaĵoj de Nikolaj Neĉajev
07 Pasis VsPLESk-3
09 Amasa kaj sukcesa BET-43
12 Kies poeto estis Eroŝenko?
13 Ĉu ni bezonas REK?
14 Nova poŝta sistemo en <reu.ru>
14 Printempa Malferma Tago en somero
15 Nova E-grupo en Tverj
15 Esperanto per rekta metodo
15 Jarlibro 2007 aperis
16 Novaj REU-membroj por 2007
17 Kotizoj de REU por 2007
18 "Amo kaj kolomboj" – kaj pri Esperanto
18 Komuna instruista trejnado
19 Du EU-parlamentanoj en kongreso de EEU
19 Paŭlo Moĵajev – nova redaktoro de "Kontakto"
20 Johano Rapley forpasis
20 Esperanto-hotelo en Bulgario
21 Grandega retejo pri Ĉuvaŝio
21 Novtipaj Esperanto-ekzamenoj preparataj
22 Laŭreatoj de "Muzo-2007"
22 "Tielas vivo" – nova albumo de "Kore"
23 Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj
23 Pri kvin ruslingvaj libroj
25 Legenda klasikaĵo estas denove havebla
26 Novaj versaĵoj de Mikaelo Bronŝtejn
11, 21, 24, 32 Anekdotoj
k3 Gratulo por Jefim Zajdman
k4 Pasis IJK-63
k4 Komenciĝis UK-92



Jan Karapetjan (filo de Evelina Sokolova kaj Rustam Karapetjan) – la plej juna partopreninto de RA-5

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 4 (41) aŭgusto 2007

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2007:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 200 rubloj sendendaj al:
Кoколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

La 8-an de julio festis sian 70-jariĝon fama jalta esperantisto Jefim Zajdman. REGo tutkore gratulas lin kaj publikigas versan gratulon de Mikaelo Bronŝtejn.

Kanteto por Jefim Z.

Mi estis nur knabet'
kun vastaj ambicioj,
vi estis tradukist'
kun famo kaj renom'.
Vi gapis kun atent'
al verkoprovoj miaj,
kaj, certe, dank' al vi
mi min eksentis hom'.

Aĥ, Fima,
en juno malproksima
kun rav' estima
mi kore sekvis vin.
Sincera rido,
prudento kaj klarvido
venigis min al fido
kaj kuraĝigis min.

Se estus sola mi –
verŝajne, neglektata
ĝi estus, tiu fakt'
de la bonŝanca pen',
sed talentula ar' –



Mikaelo Bronŝtejn kaj Jefim Zajdman en SEJT-9



Jefim Zajdman (maldekstre) en la barda ensemblo el Kolomna (foto de 1965)

Volodja, Dina, Nata
aperis por popol'
pro via interven'.

Aĥ, Fima,
la fidelec' sentima,
riĉec' anima
kaj vere hunda flar'
por trovi kantojn,
subteni la verkantojn
en vivo via estas
glorinde brila far'!

Rapidas viv' – ho ve! –
Nin ĉasas jubileoj.
Nestiĝas morboj en
maljuniĝanta korp'.
Sed ja ne tristas vi –
abundas la ideoj
en via hela kap'
kaj via varma kor'.

Aĥ, Fima,
amiko, nun translima!
La sort' pilgrima
avaras je l' renkont'…
Sed daŭras vivo –
jen estas la motivo
por ke ni plu esperu
en esperanta mond'!

Mikaelo Bronŝtejn, julio 2007



De la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto en la Vjetnamia ĉefurbo Hanojo okazis la 63-a Internacia Junulara Kongreso, en kiu partoprenis ĉirkaŭ 200 geesperantistoj el 35 landoj. Ĉar la kunveno de TEJO-komitato en IJK ne estis kvoruma, ne okazis la reelektoj de novaj Prezidanto kaj Estraro. Estas decidite, ke dume plu funkcios la nunaj Prezidanto kaj Estraro de TEJO. ***(libera folio)***



La 4-an de aŭgusto en la japana urbo Jokohamo komenciĝis la 92-a Universala Kongreso de Esperanto. En la dua tago de la kongreso la kvanto de aliĝintoj atingis la nombron 1882. Dum la kunsudo de UEA-komitato estis elektita nova Prezidanto kaj Estraro de Universala E-Asocio. Kiel nova Prezidanto de UEA estis elektita Probal Daŝgupto (Hindio). En la foto vi povas vidi la Movadan foiron dum la Interkona vespero la 4-an de aŭgusto.

LA SUNA RA, RENKONTIĜO DE AMIKOJ

Se mi nur fermetas la okulojn, rememorante tiun mirindan vojaĝon, en mia imago tuj aperas la mirakla bildo: suno estas ĉie, jen ĝi, la ora, radias el la ĉielo, jen la gajaj sunetoj, RA-simboloj, ridetas de sur niaj blankaj T-ĉemizoj kaj la sunkoloraj koltukoj, kaj min ĉirkaŭas la same sunaj ridetoj de miaj amikoj. La sunplena mondo estas la plej forta mia impreso de la renkontiĝo ĉe Bajkal.

Lastfoje mi partoprenis en siberia E-aranĝo, OrSEJT-28 en Krasnojarsk, en la fora 1987, kaj jen, post 20 jaroj mi ĝuis la revenon en tiun ravan mondon de severaj kaj majestaj montoj, sovaĝaj arbaroj kun "flortapiŝoj" kaj "pinoj-grandeguloj", diafanakvaj riveregoj kaj lagoj, en Esperantujon de mia junaĝo. Kaj mi trovis tie la saman E-popolon – junan aĝe kaj anime, gajan, sinceran, kanteman kaj amikeman.

Kvankam RA estas la tradicia aRAnĝo de Novosibirska E-klubo, ĝi jam elkreskis el tiu kadro kaj esperige iom-post-iom fakte okupas la vakan lokon de iamaj OrSEJToj, karmemoraj por mi. Bezono pri tiaj siberiaj renkontiĝoj estas grandega, ja Rusio estas tro vasta por sola tutlanda somera aranĝo. Ĉi-jare la Renkontiĝo de Amikoj pasis ekde la 15-a ĝis la 22-a de julio. La partoprenantoj de RA-5, entute 52 personoj el 3 landoj, reprezentis geografie 15 loĝlokojn ekde Colleville-Montgomery (Francio) kaj Jalta (Ukrainio) tra nia tuta lando ĝis Vladivostok; sed certe plej multis siberianoj, aparte el Novosibirsk kaj Krasnojarsk, kiujn postsekvis uralanoj. La plej juna estis Jan Karapetjan, la unujara filo de Evelina Sokolova kaj Rustam Karapetjan.


la partoprenantoj spektas komputilan prezenton

Bonan impreson lasis la lingva nivelo, aparte se konsideri sufiĉe grandan kvanton de komencantoj kaj rememori la pasintjaran, ve, krokodilan OkSEJT-on. Tion oni povas danki ne lastvice al la ĉiutaga E-kurso, gvidata de Arina Osipova (Jekaterinburg). Ŝia instruista debuto estis vere sukcesa. Ĉiumatene la tuta aro da diversaĝaj novicoj diligente kaj entuziasme lernadis la lingvon, dum la ceterajn kunvenigis agrabla konversacironda babilado en freŝa aero.

La programo estis varia, sed ne tro ŝarĝita per seriozaj eroj. El tiuj menciindas prezento de E-revuoj far ties redaktoroj kaj redakcianoj: REGo (Garik Kokolija), "Komencanto" (Raja Kudrjavceva), "Juna amiko" (Jelena Nadikova, Ĉeboksari), kaj "VIP-prezentoj", kiam pri sia E-vivo rakontis "Vere Interesaj Personoj" –


Kostja Ĥlizov (Vento), Daŝa Obrazcova kaj Katja Arbekova

Aleksandr Titajev (Vladivostok), Valentina Lisijenkova (Samara) kaj Aleksandr Kalaŝnikov (Tjumenj). Abundis klerigaj, artaj kaj ripozigaj programeroj.

Mi aldonu, ke granda plezuro por mi estis konatiĝi kun niaj francaj gastoj – la ĉarma geedza paro Ĵerar kaj Ĵiĵi (Gerard kaj Genevieve Senecal), kiuj ne timis travojaĝi Siberion kaj multe kontribuis al RA – aktivis en ĉiuj aranĝoj, rakontis pri Francio kaj montris la ĉarmegan filmon de Ĵerar pri florado de sakuro en Japanio. Malgraŭ sia aĝo dum Tago de Vojaĝantoj ili kuraĝe partoprenis en piedmarŝo kun montgrimpado kaj poste kiel ĉiuj ni staris sur la roka montopinto, ravitaj pri la majesta panoramo de la senlima lazura Bajkalo en koliero de forirantaj al la horizonto verdaj kaj poste jam bluaj montoĉenoj.

Mi ŝatus danki Kostik Vento (Irkutsk) pro la bonega ekskursa programo, aparte pro la agrabla ŝippromeno kaj vizito al la subĉiela muzeo de ligna arkitekturo en Talci, kie mi pretus vagadi ne horon, sed tutan tagon.

Grandan plezuron donacis al mi multaj koncertoj kun partopreno de Evelina Sokolova (Krasnojarsk), Kostik Vento, Daŝa Obrazcova (Tomsk), Tonja Muljukova (Ĉeboksari) kaj aliaj, poezi-kanta vespero dum Tago de Literaturo. Mi ne forgesos niajn noktajn kantadojn ĉe la ĵetanta fajrerojn en la senliman stelplenan ĉielon lignofajro, kiujn akompanis gitare Daŝa kaj Evelina, kun daŭrigo jam en la junulara ĉambro kun kantoj kaj ludoj. Tiuj rememoroj ĉiam varmigas min dum longaj vintroj.


Anĵela Belenko

Krom la belaj E-kantaretoj, kiujn preparis por ni Daŝa Obrazcova kaj T-ĉemizoj, ĉiu povis alporti hejmen memore pri RA-5 la sunkoloran koltukon kun la propramane pentrita ornamo kaj la memfaritan kolringon aŭ braceleton el lignaj bidoj, donacitaj de Anĵela Belenko (Jalta).

Ŝajnas, ke neniu staris flanke kaj preskaŭ ĉiu RA-ano plej aktive kunorganizadis la renkontiĝon: aŭ gvidis iun programeron, aŭ

kantis por ni tage kaj nokte, aŭ helpis en mastrumaj aferoj, aŭ simple kreis amikan etoson per entuziasma partopreno. Nia bona “anĝelo” Anĵela senlace zorgis pri la lignofajra kuirado kaj strebis bongustege manĝigi nin kiel proprajn infanojn, multon faris por la programo Raja Kudrjavceva, Garik Kokolija. Ne sufiĉus loko mencii ĉiujn, al kiuj mi estas danka pro la mirinda Renkontiĝo de Amikoj! Miajn gratulojn al la diversurba organiza teamo, lerte gvidata de Katja Arbekova, pro la vere sukcesa suna festo!

Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)

“PROBLEMOJN FORGESI ...”

Kiel estas bonege iufoje lasi sian urbon, trovi ie loketon (malproksime de civilizo) kaj simple ĝui naturon. La tradicia somera E-aranĝo RA-5 (Renkontiĝo de Amikoj) estas bona maniero por forgesi ĉian urban vantkuradon.

Ĉi-jare esperantistoj renkontiĝis apud la bordo de Bajkal en la vilaĝeto Bolŝije Koti. Ĉio estis belega: la naturo, la homoj, la programo. Kaj estas malfacile ĉion rakonti. Tion necesas vidi per la propraj okuloj, tion necesas senti per la propra koro.



Arina Osipova gvidas la kurson por komencantoj

Dum la tuta semajno mi (verŝajne kiel ankaŭ la aliaj partoprenantoj) povis senti min iomete sovaĝulo. Por lavi manĝilaron necesis varmigi akvon kaj stari en vico. Por paroli telefone necesis grimpi sur monton. Por manĝi necesis trovi hejtlignaĵojn kaj fari lignofajron. Vi eĉ ne imagas, kiom bongustega manĝaĵo estis tie: diversaj supoj el ĉio manĝebla, citrona trinkaĵo, fagopira kaĉo kun fromaĝo, vesperaj flanoj el la matena avenkaĉo! Grandan dankon al nia ĉefa kuiristino Anĵela Belenko (Jalta)!

Ne ĉiuj el ni vidis litkovrilojn, ĉar iuj dormis en dormosakoj, ne ĉiuj vidis aldonon dum tagmanĝo, ĉar iu pli rapide manĝis. Sed malgraŭ tio ŝajnas, ke ĉiuj estis feliĉaj, ĉar ĉiujn ĉirkaŭis malnovaj kaj novaj geamikoj, ĉar ĉiuj aŭdis bruon de Bajkal. Ĉiuj aŭdis gajajn kriojn el la lago. Tio estis kuraĝaj geesperantistoj, kiuj naĝis en la malvarmega akvo de Bajkal. Jen estas vera feliĉo! Kiel bele kaj samtempe iomete time estis sidi sur monto (kiel fiera birdo) kaj ĝui la puran kaj diafanan akvon, najbarajn montojn, trovi ie-tie malsupre malgrandajn hometojn kaj saltante saluti ilin per manoj. Ankaŭ tio ja estas feliĉo!

Mi malofte rimarkis diversajn malfacilaĵojn, ĉar estis interesa programo. Estis E-kursoj, kurseto de la japana lingvo kun teceremonio, kurso de gajaj sorĉistoj,



ĉiu povis mem ornami sian tukon

tukpentrado. Ĉiu tago havis sian temon, siajn surprizojn kaj hazardojn. Dum Tago de Amo ĉiuj havis siajn sekretajn adorantojn, kiuj faris diversajn donacetojn, skribis amajn mesaĝojn kaj diris agrablajn vortojn. Dum Tago de Sporto certe ĉiuj kuris, saltis, ludis sportludojn. Tre grandajn impresojn lasis al mi Tago de Vojaĝantoj. RA-anoj rakontis pri diversaj landoj, lokoj, kiujn ili mem vizitis pli frue. Dum Tago de Forveturo (Tago de Ekskursoj) ni vizitis lokajn muzeojn, kie oni rakontis al ni pri flaŭro kaj faŭno de Bajkal. Ni admiris belegajn bestetojn de Bajkal – fokojn. Ili naĝis en sia akvariego, kaj ni ŝrikis ekstaze!

Dankon al ĉiuj, kiuj amuzis nin tage en diversaj kursoj: al Saŝa Soboleva (Novosibirsk), kiu gvidis kurseton de la japana lingvo kaj teceremonion; al Andreo Grigorjev (Krasnojarsk) – nia gvidanto de gajaj sorĉistoj; al ĉiuj, kiuj rakontis pri siaj hobioj. Estis belaj romantikaj vesperoj kun Esperantaj kaj ankaŭ rusaj kantoj, kun varma teo kaj dolĉaĵoj. Verŝajne neniam mielkukoj, bombonoj, vafloj estos tiom bongustaj, kiel dum la malvarmaj bajkalaj vesperoj.

Sed ankoraŭ estis noktoj! Ekzemple, en urbo mi tre malofte enrigardas en la ĉielon. Sed tie, sidante en la dormosako apud la nokta Bajkalo, mi povus eterne kalkuli stelojn, kiuj mirinde trembrilas. Kaj poste ni kantis en la ĉambro, ĉar bedaŭrinde la lignofajro ne helpis al ni varmiĝi.

Grandan dankon al Daŝa Obrazcova (Tomsk), Tonja Muljukova (Ĉeboksari), Muso kaj Kostik Vento (Irkutsk), Evelina Sokolova (Krasnojarsk) pro belaj vesperaj kaj noktaj kantoj. Dankon al Koĉjo Obrazcov (Tomsk), kiu amuzis nin per gajaj ludoj. Dankon al ĉiuj, ke vi helpis nin ne dormi!

Apartan dankon al Katja Arbekova (Novosibirsk), sen kiu ni ĉiuj apenaŭ renkontiĝus ĉe Bajkalo somere, sen kiu ni ne havus tiom da bonaj impresoj!

Arina Osipova (Jekaterinburg)

LA IMPRESOJ KAJ PENSOJ

post du ĉi-jaraj regionaj renkontiĝoj

Kio povas progresigi regionan movadon? Kiu estas la plej saĝa strategio, kondukanta al ĝia sukceso? Tiuj demandoj jam delonge tiklas min, de la tempo kiam dekomence Viktoro Kudrjavcev kaj poste mi mem respondecis en REU pri regiona agado. Sed eble la respondo al tiuj demandoj kuŝas antaŭ niaj nazoj...

Mi ŝatus kunligi kaj rakonti pri miaj impresoj de du regionaj renkontiĝoj: "Es-

Primo-4” kaj RA-5. De la unua mi estis la ĉefa organizanto; por la sukceso de la dua mi ĝojis kunlabori kaj kontribui.

“EsPrimo-4” okazis dum majaj festoj en Tjumenj kaj havis la temon: “Regiona agado. Klubaj interrilatoj”. La temo kaj la enhavo de la aranĝo bone respegulis la kunlaboron de esperantistaro de la regiono. Tio estis la renkontiĝo plena de puŝoj, de fantazio kaj kreemo, kaj dum ĝi ĉiuj kunagis laŭ propra karaktero kaj persona kapablo. Tjumenanoj zorgis pri la bazejo, manĝado, teknikaj aferoj kaj ekskursa parto de la aranĝo. Jekaterinburganoj organizis la partoprenon en la renkontiĝo de profesoro A.Melnikov kun la serio de liaj prelegoj por la esperantistoj kaj ankaŭ por neesperanta publiko; preparis kaj gvidis multajn programerojn – “Amikan Vesperon”, “Gajan vesperon” k.a. Malnovajn spertajn esperantistojn kunigis nia toboljska aktivulino Dilara Gadirova, kiu inciatis kaj gvidis la “Nostalgiajn momentojn”. Ĉiujn kantigis la ĉeljabinskanoj Galja kaj Nikolao Terentjev-oj kaj Sergeo Fedotov el Kogalim. Sed estis programeroj, al kiuj samtempe kontribuis diversurbaj esperantistoj: tio estis ronda tablo pri regiona agado, kiam ĉiuj ĉeestantoj energie elpaŝis en diskutoj kaj prezentis ideojn (cetere, jam tiam okazis unuaj interkonsentoj pri kunlaboro dum RA); tio estis prezentado de sursceniĝita japana fabelo de V.Jeroŝenko “Persika nubeto”, kiam rolludis gejunuloj de Tjumenj kaj Jekaterinburg; tio estis la prezentado de originalaj kolektoj kaj kune farita ekspozicieto “Niaj urboj printempe”. Kiom da valora kaj interesa eblas fari kune, apogante nin je amikaj interrilatoj!


ĉiu matena kunveno dum RA enhavis iun gajan ludon

RA-5 estas ankoraŭ freŝdata okazintaĵo, ĝi pasis meze de julio ĉe lago Bajkal, sub lerta gvido de Novosibirska aktivulino Katerina Arbekova. La aranĝo ne vane estas titolita RA – Renkontiĝo de Amikoj, ĉar la plej karakteriza vorto por ĝi estas la vorto “amikeco”. La renkontiĝo vere estis tre amikeca kaj varmetosa kaj dum ĝi eblis konstati la harmonian kunlaboron de diversaj E-kluboj kaj E-unuopuloj el diversaj urboj: Irkutsk, Novosibirsk, Krasnojarsk, Vladivostok, Tjumenj, Jekaterinburg, Samara, Moskvo, kaj eĉ el du aliaj landoj: Ukrainio kaj Francio. Kio kunigas tiujn du renkontiĝojn? Mi povas mencii kelkajn komunajn trajtojn. Unue, la amika kunlaboro, en kiu eblas kapti plurajn instruojn, – la plej ĉefa, ke la sukceso de iu aranĝo multe dependas de la efika kombinita partopreno de ĉiuj. Konklude: estonte ni penu okazigi ion ne nur per fortoj de unu E-klubo aŭ E-grupo de unu urbo-gastiganto, sed dividu la taskojn inter la kluboj kaj grupoj tiel, ke ĉiu ludu sian ro-



ekiro al la piedmarŝo

lon. Alivorte: “Ni kuniĝu por esti pli fortaj!”.

Due, ambaŭ renkontiĝoj havis bonajn distraĵojn kaj multajn seriozajn aferojn. Gravas, ke estu ekvilibro inter ili. Trie, en tiuj renkontiĝoj ni ĉerpas fortojn por agi estonte, entuziasmiĝas, inspiriĝas, bonhumoriĝas.

Sed RA-5 ĉe Bajkal havis sian unikan specifecon: partoprenantoj ĝuis ne nur la renkontiĝon mem, sed ankaŭ tre bonan naturmedion. Ĉar tio estas oazo de belego kaj trankvilo; la lago estas fantazia – koloroj ŝanĝigas de mateno ĝis vespero multfoje; ĉirkaŭaĵoj estas ĝojo por la okuloj; en freŝe verda arbaro birdoj pepas ĝojplene. Ĉio vekas en vi estetikan admiron kaj inspiron, donacas al vi mirindan senlaciĝon kaj facilecon. Se vi volas, ke la problemoj forlasu vin, vizitu Bajkalon – idealan lokon por ripozi anime. Mi konscias, ke iam poste aperos en la kapo tavoloj de jam novaj impresoj, sed ankaŭ ili apenaŭ forviŝos la bildojn de Bajkal el la memoro.

Fini miajn impresojn mi ŝatus, kiel ĉiam, optimisme rigardante en la estonton. Mi kredas en la teorion de stafeto, kiam sukceson, atingitan dum unu aranĝo, eblas transdoni al la alia. Baldaŭ pli ol dudekpersona urala E-teamo vojaĝos por partopreni en RET ĉe Azova maro kaj ni esperas transdoni al RET-anoj la torĉon de bonŝanco kaj sukceso!

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

Nikolaj Neĉajev (Irkutsk)

Senekaloj

Alvenis Senekaloj
El lando Normandi’,
Alvenis al la valoj
En lando Siberi’.
Alvenis al la montoj,
Al tajdo de Bajkal,
Al belaj horizontoj
Por nobla ideal’.
Alvenis por vespere
Sub luno ĉe la flam’
Ekkanti ĉi-somere
pri ĝojo, bono, am’.



Gerard kaj Genevieve Senecal

Ĉe lignofajro

Ĉe varma lignoflamo
Apudas amikaro.
Parolas pri la amo
Ĉe steloj la gitaro.
Matene ni revenos
Al urboj tre malsamaj.
Por ĉiam apartenos
La kor' al noktoj flamaj.
Somere ni revenos
Al lando ĉebajkala,
Denove apartenos
Al vivo ideala.



Rustam Karapetjan kaj Evelina Sokolova kun la filo Jan

PASIS VsPLESk-3

La 09-an – 12-an de junio 2007 en Pljos la trian fojon sukcese pasis malfermita festival-speca renkontiĝo "VsPLESk-3", organizita de la du ivanovaj esperantistaj organizoj (junulara E-klubo "Teamo" kaj Ivanova Medicinista Esperanta Asocio IMEA) kaj moskva junulara E-klubo "EK MASI". En ĝi partoprenis 143 personoj el jenaj urboj: Moskvo, Ivanovo, Dimitrovgrad, Ĵukovskij, Niĵnij Novgorod, Nabereĵnije Ĉelni, Jaroslavlj, Sankt-Peterburg, Odincovo, Kostroma, Koĥma.

Ĉirkaŭ 60 homoj loĝis en la 30-lita dometo, aliaj – en propraj tendoj en apuda arbareto. Tio iom disdividis la programon laŭ la loĝ-principo. En la bazejo senĉese okazadis teumado, masaĝoj kaj kuirejaj ĉetablosidadoj, ankaŭ diversaj interesaĵoj en la ĉambro № 8 – ĉefe ĉio, ligita kun Esperanto kaj la eksterprogramaj rondoj de "Propra ludo". En la tendaro sur la kampeto okazis porinfana-porgepatra programo, ĉe la arbo estis seninterrompa trejnado pri ŝnur-grimpado kaj amuzado per la altega balancilo, ĉe la fajro tutajn noktojn sonis kantoj, pasis ankaŭ fojaj aranĝoj, ekzemple, gastronomia klaso kaj librointerŝanĝo. La plej amasaj programeroj estis en la apuda ligna dometo "Izba" – psikologiaj trejnadoj, prelegoj (inter kiuj – "Знакомьтесь: эсперанто" (Konatiĝu: Esperanto) far Garik Kokolija), danc-klasoj, teatra metiejo – kaj sur la sporta placeto (amasaj dancadoj kaj fajrosvingado).

Do, por spertuloj el ĉio ĉi evidentas, ke la aranĝo estis StRIGo-speca, sed nia partoprenantaro estis, eble, 40-procente neesperantista kaj neniuj specialaj emfazoj pri Esperanto estis truditaj al la homoj. Ni simple ekzistis en la tipa por



Irina Gonĉarova, Natalja Nikolajeva kaj Nadeĵda Terjoĥina



tea ceremonio sur la herbejo

esperantistoj etoso de amikeco, akceptemo kaj toleremo, en plena pozitivo al Esperanto kaj esperantitoj. Mi certas, ke ankaŭ tiu ĉi VsPLESk liveros al E-movado kelkajn novajn gelernantojn kaj aktivulojn.

Menciindas alvorte, ke la pasintjaran VsPLESk-on partoprenis du apenaŭ rimarkeblaj ivanovaj knabinoj, ĵusaj kursfinintoj de Maŝa Ĵukolina. Ĉi-foje ili estis la ĉefaj lokaj organizantinoj – trovis la bazejon, traktis kun ties estroj, registris la homojn, okupiĝis pri la financoj ktp. Sen ilia sindona laboro nenio povus okazi. Temas pri Jelena Kormilicina kaj Natalja Ĵuravljova. Sed se ni emus elekti Princinon de la aranĝo, laŭmerite la kronon gajnus Misa (Natalja Nikolajeva) el EK MASI, kiu tra tutaj diurnoj zorgis pri la programo kaj gvidis vesperajn amasajn programerojn – skotan dancadon kaj etnan diskejon. Menciindas ankaŭ inspiranto kaj gvidanto de la porinfana programo Nastja Kirillova, Pavel Volkov (kiu antaŭ 8 jaroj lanĉis E-aranĝojn en Pljos) kaj el neesperantistaj moskvanoj – Volodja Savinov – nia financa, morala kaj tea apogo, senlaca kaj fidinda.

Sendube, ĉiuj gvidantoj meritas apartan dankon kaj mencion, ĉar – mirinde, sed vere – ĉiuj programeroj ricevis nur admirajn reeĥojn de la partoprenintoj. Furoris intelektaj ludoj fare de Vladimir Markovnin (Ivanovo) kaj Garik Kokolija (Moskvo); ĝuigis kanta klaso de Saŝa Terjoĥina (Nabereĵnie Ĉelni), gastronomia metiejo de Timur Belov (Jaroslavlj), dancklasoj de Nastja Borisova (Dimitrovgrad) – la arabaj, Nastja Afanaskina (Moskvo) – la hindaj, Olesja Naumenko (Moskvo) – la irlandaj, Frank Daza (Kolombio) – "merenge", Andrej Stepanov kaj Ira Fokina (Moskvo) – "hastl"; kun amasa partopreno pasis du aranĝoj de Nadeĵda Terjoĥina (Nabereĵnie Ĉelni) – ekskurso al la naturo kaj la kvizo "Эрудит" (Erudito), ankaŭ "Надувалочка" (Trompludo) kaj finfine – la "Homlupoj" fare de Verdalin (Anna Ŝtondina). Tamen ne eblas listigi ĉi tie ĉiujn programerojn kaj ĉiujn kontribuantojn al la festo, kiu nomiĝas VsPLESk. Legu reeĥojn, vidu la fotojn ĉe la ttt-ejo de EK MASI <www.moskvo.ru>! Kaj nepre partoprenu en la sekva jaro!

Irina Gonĉarova (Moskvo)



"Propra ludo" por la sciuloj

AMASA KAJ SUKCESA BET-43

La 14-an – 22-an de julio en la nordlitovia urbo Šiauliai okazis la tradicia somera ĉiujara aranĝo de Baltiaj esperantistoj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Tiu ĉi jam la 43-a tradicia aranĝo, okazanta ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio, estis dediĉita al la 80-jariĝo de organizita Esperanto-movado en Šiauliai. Ĝin organizis Litova Esperanto-Asocio kune kun urba Esperanto-klubo "Ruto". La aranĝon partoprenis 322 esperantistoj el 18 landoj (Litovio, Latvio, Pollando, Finnlando, Estonio, Belorusio, Rusio, Belgio, Germanio, Italio, Aŭstrio, Ĉeĥio, Francio, Nederlando, Portugalio, Slovakio, Ukrainio, Svedio). Sekve, tiu ĉi BET fariĝis la plej amasa en tiu ĉi jardeko, jarcento kaj jarmilo. Litovion reprezentis esperantistoj el 23 urboj.

La aranĝo pasis en la fakultato de sociaj sciencoj de la Universitato de Šiauliai. Alta protektanto de la aranĝo estis la urbestro de Šiauliai Genadijus Miksys. BET-43 ĝuis gravan helpon kaj ĉiuflankan subtenon flanke de la urbo, la universitato, la fakultato kaj de aliaj organizaĵoj kaj instancoj de Šiauliai. La urbestro de Šiauliai Genadijus Miksys mem partoprenis solenan inaŭguron de BET-43 kaj faris paroladon parte en Esperanto, ankaŭ aranĝis akcepton por trideko da esperantistoj en la urbestrejo. Ne mankis ankaŭ financa subteno kaj speciale subteno por kultura programo de la aranĝo flanke de urbaj artaj ensembloj kaj kolektivoj. Al BET-43 salutmesaĝojn sendis la prezidanto de Litovia parlamento, la Prezidanto kaj la Ĝenerala direktoro de UEA, la nepo de la kreinto de Esperanto d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof. La solenan inaŭguron partoprenis kaj faris paroladon plene en Esperanto vicrektoro de la Universitato de Šiauliai pri sciencaj aferoj prof. Vaclovas Tričys, ankaŭ la dekano de la fakultato de sociaj sciencoj d-ro Teodoras Tamosiunas krom salutparolado dum la solena inaŭguro aranĝis post ĝi akcepton por ĉiuj partoprenantoj de BET-43.



la solena inaŭguro

La programo de BET-43 estis tradicia. Someran Universitaton gvidis prezidanto de Senato de la Universitato de Šiauliai vicprezidanto de Litova Esperanto-Asocio prof. habil. d-ro Aloyzas Gudavicius, okazis 20 altnivelaj prelegoj pri la plej diversaj temoj (la listo de la prelegoj troveblas en la retejo de Litova Esperanto-Asocio <www.esperanto.lt> kaj en la ĉiutaga gazeto de BET-43 "Sagisto" n-ro 3) – la prelegintoj estis el Litovio, Latvio, Estonio, Rusio, Finnlando, Slovakio, Belgio. Krome, okazis praktika trejnado pri Vikipedio, dum la tuta periodo funkciis dunivelaj Esperanto-kursoj. Okaze de la 80-jariĝo de organizita Esperanto-movado

en Šiauliai aperis dulingva (en la litova kaj Esperanto) historia libro de Romualdas Rutkauskas "“Ruto” levis Esperon" ("“Ruta” kele vilti"). Ĝi estis oficiale prezentita en BET-43. Gastoj el la rusia apudbaltmara urbo Kaliningrad, eldonantoj de la revuo “La Ondo de Esperanto” kaj posedantoj de la eldonejo “Sezonoj” Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov lanĉis dum BET-43 novan trivoluman eldonon de “La Mastro de l’ Ringoj” de J.R.R.Tolkien. Tiu ĉi eldono estis presita en la litova urbo Kaunas, la kovrilon aranĝis litova pentristo Vladimiras Beresniovas. La kaliningradanoj ankaŭ prezentis sian eldonejon “Sezonoj”, la revuon “La Ondo de Esperanto” kaj rilatajn agadojn. Ili ankaŭ gvidis literaturan kvizon. Kvizon pri ĝeneralaj temoj aranĝis Nora Caragea (Germanio), kiu ankaŭ gvidis komunajn ludojn por BET-anoj. Honora Membro de UEA eksredaktoro de “Litova stelo” Petras Čeliauskas ĉiutage dum unu horo konatigis eksterlandajn partoprenantojn kun la litova lingvo, literaturo kaj kulturo ĝenerale. Genovaite Liepinia demonstris du filmojn en Esperanto, kreitajn de ŝiaj lernejanoj. Michael Cwik el Belgio prezentis sian filmon pri Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj ankaŭ prelegis pri lingvaj problemoj en Eŭropa Unio. Katolikan Diservon en Esperanto en la urba Katedralo celebris katolika pastro Valerijus Rudzinskas. Enkadre de BET-43 okazis ĉi-jare post longa interrompo renovigitaj belartaj konkursoj “Muzo-2007”, gvidataj de Jurate Bartaskiene. El dek anoncitaj branĉoj konkurso okazis en kvar: mankis partoprenantoj por la branĉoj Kantoteksto, Melodio, Arta legado, Rakontado, Kantado kaj Pentraĵoj.



dum unu el la ekskursoj

En BET-43 estis tre riĉa kultura kaj arta programo. Ĉiuvespere okazis diversaj koncertoj: de muzik-vokala ensemblo “Folk-Rom” el Pollando, de fakultata ensemblo “Kitava”, de flutistino Lidija Gomolickaite-Grudzinskaite kaj versdeklamanto Marius Dyglys, de kantelistina ensemblo de “Ausrine” kaj kantistino el la urba konservatorio, de naciaj ensembloj “Selmiai” kaj “Va jaunas” el la urba kultura centro, de ensembloj “Zelmeneliai” kaj “Derme”, de akordeonistoj el la urba konservatorio, de ensemblo “Animo” gvidata de Aŭstra Pumpure el la latva urbo Liepaja. Krome, okazis unu tuttaga kaj kvar duontagaj ekskursoj. Ĉiutage funkciis riĉa libroservo, eblis aboni “Litovan stelon”. Ĉiutage en 300 ekz. aperis kvarpaĝa kolora gazeto de BET-43 “Sagisto”, kiun zorge redaktis Taesok Choe. Entute aperis sep numeroj, ĝi publikigis multajn valorajn kaj aktualajn informojn kaj multajn fotojn el la vivo de BET-43. Ĝi ankaŭ estas legebla en la retejo <www.esperanto.lt>.

La fakultato de sociaj sciencoj senpage permesis uzi ĉiujn instalaĵojn, por dis-

pono de esperantistoj estis kelkdeko de komputiloj kun retaliro. Ĉiuj prelegejoj estis moderne ekipitaj per ĉiuj bezonataj teknikaĵoj.

Gravan helpon la organizantoj de BET-43 ricevis flanke de la urba turisma kaj informa centro de Šiauliai. Ĝi proprakoste eldonis en Esperanto 64-paĝan plenkoloran turisman gvidilon pri Šiauliai, kiun senpage ricevis ĉiu partoprenanto de BET-43. Krome ĝi en sia retejo publikigis bazajn informojn pri BET-43 kaj profesie preparis ĉiujn itinerojn de ĉiuj ekskursoj kaj donis siajn ĉiĉeronojn, donacis al BET-anoj mapon de la urbo.

Ĉiu partoprenanto de BET-43 ricevis riĉenhavan valizeton (fotolibreto pri Šiauliai, turisma gvidilo pri Šiauliai, programo de BET-43, specialaj notlibreto, leterpapero kaj koverto, informfolio pri la fakultato, plano de ekskursoj, tekstoj de litovaj kantoj, libreto por katolika Diservo, persona ŝildeto k.s.). Fotolibreton pri Šiauliai kun teksto ankaŭ en Esperanto, donacitan al ĉiu partoprenanto de BET-43, proprakoste eldonis la urba administracio.

BET-43 altiris grandan atenton de lokaj kaj tutlandaj amaskomunikiloj (gazetaro, radioj, televidoj, retgazetoj, novaĵagentejoj k.s.). Aperis pli ol 20 publikaĵoj, plejparto el ili estas listigitaj en la “Sagisto” n-ro 7. Litova Esperanto-Asocio detalan kaj ampleksan gazetaran komunikon pri BET-43 dissendis al pli ol 100 diversaj adresoj.

La ampleksa Organiza komitato de BET-43 multe laboris preskaŭ dum jaro por sukcesigi la aranĝon. Precipe multe kontribuis sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Jurate Pupstaite kaj vicprezidanto de Organiza komitato de BET-43 honora civitano de la urbo Šiauliai Zenonas Sabalys.

Litova Esperanto-Asocio kore dankas al ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj, kiuj helpis en organizaj preparlaboroj de BET-43, al ĉiuj esperantistaj organizantoj, al ĉiuj kontribuintoj por la programo de BET-43, al ĉiuj partoprenintoj de BET-43 pro la grava kaj bela aranĝo!

La sekva BET-44 okazos la 5-12-an de julio 2008 en la latva urbo Ventspils. Bonvenon!

Povilas Jegorovas (Litovio)

Maljuna paro gastis ĉe la hejmo de alia paro. Post la vespermanĝo la edzinoj eniris la kuirejon. La du sinjoroj konversaciis kaj unu diris:

– Lastvespere ni iris al nova restoracio, ĝi estis vere bonega. Mi multe rekomendus ĝin.

La alia viro demandis:

– Kiel la restoracio nomiĝas?

La unua viro longe pensis kaj finfine respondis:

– Kiel nomiĝas tiu speco de floro, kiun oni donas al tiu kiun oni amas? Vi scias... kiu estas ruĝa kaj havas dornojn...

– Ĉu vi celas rozon?

– Jes, ĝuste, – respondis la unua viro kaj turnante sin al la kuirejo kriis:

– Rozo, kiu estas la nomo de la restoracio kiun ni vizitis lastvespere?

(esperanto-anekdotoj)

KIES POETO ESTIS EROŜENKO?

La revuo "Esperanto" en la freŝa n-ro 1205 (7-8), p. 150 publikigis informon pri tio, ke en Kievo establiĝis speciala studo-centro pri la vivo kaj verkaro de Vasilij Eroŝenko. Ni gratulu la kievajn kolegojn okaze de la rimarkinda evento kaj deziru al la studo-centro sukcesojn en publika informado pri la elstara esperantisto.

Tamen, bedaŭrinde, en la artikoleto (kiu ne estas subskribita) troveblas dubindaj asertoj.

Unue, Eroŝenko estas nomita "ukraina poeto". Estas interese, laŭ kiu kriterio? Ĉu laŭ la ĉefa – pro la lingvo de liaj poeziaĵoj? Tamen ni konas lin kiel aŭtoron de Esperantaj kaj japanaj poemoj, de ruslingvaj eseoj. Sed ĉu ekzistas informoj pri tio, ke li verkis ankaŭ ukraine? Se jes, kiom signifan parton okupis ukrainlingvaj poeziaĵoj en lia verkaro?

Aŭ eble oni nomis lin tiel pro la temaro de liaj verkoj? Do – ĉu inter la poeziaĵoj de Eroŝenko multas tiuj, en kiuj li tuŝas specife ukrainajn temojn?

Ĉu, fine, oni konsideras lin ukraina poeto simple pro laŭdira aparteno al la ukraina nacio? Sed tio estas dubinda: en la almanako "Impeto'91", p. 145 ni povas vidi fotitan enketilon, kiun Vasilij Jakovleviĉ plenigis por Komunista Universitato de laboruloj de Oriento; en tiu enketilo la 5-a paragrafo tekstas: "Национальность рус[…]" (nacieco rus[…]) (la daŭrigo estas kovrita de alia enketilfolio). Kaj ĝenerale, por tiaj atribuoj la etna kriterio estas per si mem stranga: laŭ ĝi oni devus konkludi, ke ekz. Okuĝava estis kartvela poeto kaj Marŝak – juda poeto…

Alia mirindaĵo en la informo: kiel hejmlando de Eroŝenko estas nomita Ukrainio. Kial do? Ja estas bone konata fakto, ke li naskiĝis en 1890 (aŭ 1891, laŭ aliaj fontoj) en la vilaĝo Obuĥovka de Kurska gubernio, kiu evidente ne apartenis al Ukrainia parto de tiama Rusia Imperio. Jam infanaĝe Vasilij eklernis en Moskvo, poste longe vivis eksterlande, post la reveno loĝis denove en Moskvo, vojaĝis al ĉukĉoj, laboris en Turkmenio kaj mortis en 1952 en la sama Obuĥovka, kiu tiam apartenis al Kurska provinco de RSFSR kaj nun – al Belgoroda provinco de Rusia Federacio.

Ĉu estas iuj faktoj pri tio, ke Eroŝenko loĝis ankaŭ en Ukrainio, kaj ĉu tiu loĝado estis sufiĉe daŭra kaj grava por konsideri Ukrainion lia hejmlando?

Eroŝenko estis homo legenda. Kvankam la bazaj eroj de lia biografio estas jam vaste konataj, ankoraŭ restas en ĝi blankaj makuloj. Ĉu eble esplorantoj de la studocentro aŭ aliaj eroŝenkologoj sukcesis malkovri nekonatajn faktojn kaj plenigi iujn el tiuj makuloj? Se jes, mi petas la kolegojn rakonti pri tio ankaŭ al ni kaj respondi la suprajn demandojn. Por la legantaro de REGo tio sendube estus interesa!

Tamen ĝenerale, se distanciĝi de formalaj kriterioj, mi solidaras kun tiuj, kiuj opinias, ke aplike al Eroŝenko tiaj kriterioj ne ludas esencan rolon. Lin ne eblas loki sur iun nacian "breton", ĉar laŭ sia mondkoncepto li estis homarano, do persono (ekster/inter/preter/sen/super/trans/…)nacia – la prefikson elektu laŭplaĉe. Kaj la vera hejmlando de Vasilij Eroŝenko estis la tuta terglobo.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

ĈU NI BEZONAS REK?

Antaŭ dudek jaroj en Rusio en la tutlanda nivelo okazis preskaŭ nur junularaj aranĝoj: OkSEJT, OrSEJT, EoLA.

Ekde 1990 al tiuj aldoniĝis Landa (poste Rusia) E-kongreso, kiu dekomence estis kune organizata de SEJM kaj SEU/REU. La aranĝo ne ĉiam okazis ĉiujare, foje eĉ estis trijara paŭzo, kio ne vere kontribuis al populariĝo de la aranĝo. Ne tre helpis ankaŭ ne ĉiam interesa programo kaj klara "specialiĝo" de la aranĝo pri kunsidoj kaj reelektaj proceduroj. Ekde 2000 ĝi tamen okazis ĉiujare (*en 2001 eĉ dufoje – Red.*) krom en 2003 kaj 2006.

Ekde 2002 al la listo de niaj tradiciaj aranĝoj aldoniĝis RET – Rusiaj Esperanto-Tagoj, kiu ekde tiam okazas ĉiujare. La tradiciiĝo kaj stabiliĝo de REK kaj RET klare koincidas kun malstabiliĝo kaj certa degenero de la junularaj aranĝoj – OkSEJT kaj EoLA. Aperas impreso, ke por du tutlandaj tendaroj somere kaj por du tutlandaj aranĝoj vintre en la lando ne sufiĉas organizantoj, intereso kaj publiko.

Mi kredas, ke venis la tempo rekoncepti la sistemon de niaj aranĝoj. La kondiĉoj ŝanĝiĝis, kaj ni devas adapti niajn labormetodojn al ili. En 2000 refortiĝinta REU petis de REJM la rajtojn kunorganizi kaj kunposedi OkSEJT kaj EoLA – kaj ricevis sufiĉe kompreneblan rifuzon. Tial aperis RET, tial estis stabiligita REK. Ankaŭ la tiama strategio de REU estas klarigebla.

Sed nun, kiam REU kaj REJM havas unuigitan membraron kaj fakte estas unu organizo, tiu "duobla sistemo" ne plu havas sencon kaj disipas niajn nemultajn fortojn. Sed kio do restu, kio malaperu ?

Sufiĉe klara kandidato por forgeso estas REK. Kongreso kun trideko da partoprenantoj estas ne kongreso, do, ni ne plu tiel ŝercu. Nek restis en la lando pluraj sendependaj E-organizoj, kiuj povus esti ĝiaj kunorganizantoj, kiel iam konceptite. De ĝi restu REU-Konferenco, kiu laŭbezone povus okazi kadre de iu somera aranĝo aŭ sendepende, aŭ konekte kun iu nesomera aranĝo.

Tio signifas, ke dum la vintra-printempa (aŭ aŭtuna?) tempo restu nur EoLA – aŭ iu alia nova aranĝo. Sed ĉar pri io nova ne estas dume anoncitaj planoj, do ni diru, ke tio estu la arta festivalo EoLA. Ĝi laŭeble ricevu junularan karakteron kaj **nepre** estu interesa por komencantoj – ĉar ĝustatempe subtenitaj kaj pozitive emociitaj novaj talentoj estas la estonto de nia movado.

Pri la someraj aranĝoj estas iom pli komplike. Ĉi-jare aspektas tiel, ke OkSEJT mortis, kvankam la lastaj provoj ĝin okazigi – en 2005 kaj 2006 – montras, ke malgraŭ ĉio ĝi kapablas kunvenigi eĉ iomete pli da partoprenantoj ol la okazanta samsomere RET.

Surbaze de tio kaj kelkaj aliaj konsideroj, mi mem estas **por** ke restu OkSEJT. Sed prefere ĝi nomiĝu RET. Aŭ REJT. Tio estu renkontiĝo, organizata de REU an-

taŭ ĉio por junularo – sed volonte akceptanta ĉiun anime junan personon, parolantan E-on. Kial por junularo? Ĉar junularo pli bezonas tiajn renkontiĝojn ol la tro okupitaj aĝuloj. Ĉar komencantoj, kiuj ankoraŭ aperas en niaj malmultnombraj E-kluboj, plejparte estas junaj. Ili pli volonte irus al junulara tendaro kaj pli volonte tie lernus, se vidus ĉirkaŭ si bone parolantajn samaĝulojn.

Sed kio pri "aĝuloj"? Ĉu ili ne restus forgesitaj? Mi pensas, ke neniuokaze. La aĝuloj rajtus sendiskriminacie veni al la aranĝoj. Ja ili estos REU-aranĝoj, do servoj de REU por ĉiuj membroj. Sed, konsciante sin gastoj de junularo, aĝuloj pli pardoneme rilatos al la gejunulaj pekoj/mankoj kaj pli facile okupos ne instrukciantan, sed instruantan pozicion. Kroma pluso estas, ke en junulara tendaro neniu devigos aĝulojn ludi "infanajn ludojn".

Resume pri la proponata nova skemo de REU/REJM-aranĝoj:

Restu: somere – RET (REJT), vintre-printempe – EoLA (aŭ io alia, sed nepre junularkaraktera kaj ankaŭ porkomencanta); REU-Konferenco – ĉu aparte, ĉu tuj antaŭ iu el tiuj aranĝoj, preferinde ne en ili.

Malaperu: OkSEJT kaj REK.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

NOVA POŜTA SISTEMO EN <REU.RU>

Ekde la aŭtuno ĉiuj "ret-konektitaj" aktivuloj de REU povos ricevi retadresojn kun la finaĵo <@reu.ru>. La servo estos senpaga, aliaj kondiĉoj dume estas nedifinitaj. La nova poŝta sistemo estas aranĝita surbaze de Google-servo, unu el la plej fidindaj poŝtaj serviloj en la mondo. La uzantoj havos ĉiujn ordinarajn avantaĝojn de tiu poŝta sistemo, i.a. 2-gigabajtajn poŝtkestojn.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

PRINTEMPA MALFERMA TAGO EN SOMERO

Kun pli ol 90 vizitantoj el 15 landoj la Centra Oficejo de UEA spertis nekutime multnombre vizitatan "printempan" Malferman Tagon sabate, la 2-an de junio. Pro la rekonstruado en la oficeja domo tiu ĉi aranĝo, organizita jam por la 26-a fojo, okazis pli malfrue ol kutime kaj fariĝis fakte somera Esperanto-aranĝo. Anstataŭ la nova konferencejo de CO la programo disvolviĝis en la oficistaj laborĉambroj de la unua etaĝo, kies rekonstruado finiĝis tiel lastmomente, ke la oficistoj ne havis tempon por reveni al siaj kutimaj lokoj el la konferencejo, kien ili estis evakuitaj por la daŭro de la konstruado.

La ĉefa gasto estis Claude Piron, kiu elektis iom provokan temon por sia dufoje prezentita prelego: "Ĉiuj neesperantistoj estas afaziuloj". Lucas Vignoli Reis, vojaĝanta "ataŝeo" de Brazila Esperantista Junulara Organizo, prelegis kun sonaj kaj bildaj specimenoj pri la muziko de sia lando. Yves Nevelsteen kaj Petro Balaz enkondukis la publikon en la retan enciklopedion Vikipedio. La tutan tagon estis ankaŭ montrataj Esperanto-filmoj. Surpriza aldono al la programo estis la flamenka versio de "La espero" fare de Solo.

La plej furora libro dum la Tago estis la ĵus aperinta "Afero de espero: Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko" de Heidi Goes, kiun la aŭtorino mem

prezentis kadre de la programo. “Afero de espero” vendiĝis en 17 ekzempleroj. Malkovrinte, ke la Libroservo de UEA ankoraŭ posedis 15 ekz. de “Maks kaj Moric”, germana ŝatanto de tiu infanlibra klasikaĵo tuj aĉetis la tutan stokon tiel certigante al ĝi surprizan duan lokon. De “Vikipedio: praktika manlibro” estis venditaj 9 ekz. kaj de la ĉiam populara lernolibro “Saluton!” – 6 ekz. Po 5-ekzemplere vendiĝis “Lingvo kaj popolo” de Humphrey Tonkin, “Ĵim la migrulo: aventuroj de juna leopardo” de S.Stampa kaj la nova poemaro de Jorge Camacho “Eklipsas”. Entute la Libroservo vendis librojn kaj aliajn varojn por 2054 eŭroj.

La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos sabaton, la 24-an de novembro 2007.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVA E-GRUPO EN TVERJ

Kiel jam estis informite, ekde printempo en Tverj ekfunkciis nova E-grupo “Ekvinokso”. Ĝin kreis nunaj kaj antaŭaj membroj de REU – loĝantoj de Tverj, lernintaj E-on memstare. Igorj Ĥomjakov, la gvidanto de la klubo, ĵus skribis, ke la grupo daŭre aktivas, regule kunvenas kaj kreas planojn por estonto. En aŭgusto oni unuafoje provos gastigi alilandan e-iston.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

ESPERANTO PER REKTA METODO

Stano Marĉek, konata slovakia e-isto kaj la redaktoro de la revuo “Esperanto”, en julio eldonis la rusan version de sia avangarda lernolibro “Esperanto per rekta metodo”. La rusigon faris Bronislav Ĉupin el Iĵevsk.


Kiel diras la titolo, la libro servas kiel helpilo por lernantoj en la rektmetoda E-kurso – do, kie oni tuj “enigas” lernantojn en la lernatan lingvon, klarigante la sencon de novaj vortoj per bildoj, situacioj, mimiko ktp – sed nur ne helpe de la nacia lingvo de la lernanto. Elstare bone estas, ke tiametoda libro estas tre riĉe kaj lerte ilustrita (diference de la klasika “Ĉe-metoda lernolibro” de Internacia Esperanto-Instituto). Ĉio estas tre klare kaj kompetente prezentita, tiel ke espereble eĉ nespertaj instruistoj povos sukcese uzi la lernilon. La lernilo havas modernan grafikan aspekton, kio elstarigas ĝin kompare al la aliaj ruslingvaj lernolibroj.

REU kaj Eŭropa Jurscienca Universitato “Justo” jam mendis certajn kvantojn de la lernolibro por uzado en rusiaj E-aranĝoj kaj kursoj. Se ni estos bonŝancaj, la unua stoko atingos nin jam antaŭ RET-07 kaj tiukaze la lernolibro povos esti testita en la lingvaj kursoj de la aranĝo.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

JARLIBRO 2007 APERIS

Portreto de Antoni Grabowski (1857-1921) malfermas la ĉi-jaran Jarlibron de UEA omaĝe al la 150-a datreveno de la granda poeto-tradukisto, kiu grave influis la evoluon de la lingvo. La apero de la Jarlibro preskaŭ koincidis kun lia naskiĝtago la 11-an de junio. En la antaŭparolo Renato Corsetti, por la lasta fojo kiel prezidanto de UEA, traktas la rolon de tiu ĉi populara Esperanto-libro, al kiu la



evoluo de komunikrimedoj nun metas aliajn defiojn ol en la tempo, kiam Hector Hodler redaktis ĝin.

Kun 1733 adresoj en 102 landoj la Jarlibro havas 56 delegitojn malpli kaj 3 landojn pli ol pasintjare, kiam estis 1789 delegitoj en 99 landoj. Estas 53 ĉefdelegitoj (52 en 2006), 976 (1006) lokaj delegitoj, 118 (116) vicdelegitoj, 39 (40) junularaj kaj 1295 (1333) fakaj delegitoj. Krome en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn. La nombro de kontakt-informoj pri lokaj kluboj restas sama kiel pasintjare, 81 en 28 landoj. La proporcio de rete atingeblaj delegitoj plu kreskis, kvankam la jaroj de rapida kresko jam pasis. Entute 1223 (70,6%) delegitoj anoncas retadreson. En Jarlibro 2006 ili estis 1233 (68,9%).

En la unua parto de la Jarlibro, eldonita ankaŭ aparte kun la titolo Gvidlibro 2007, aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, Akademio de Esperanto, edukaj kaj kulturaj organizaĵoj, bibliotekoj ktp. Tie legeblas ankaŭ la Esperanto-rezolucioj de Unesko kaj la Gvidlinioj por informado de UEA. La Jarlibro enhavas ankaŭ anoncojn kaj rabatkuponon de la Libroservo de UEA.

Individuaj membroj de UEA povas profiti de la informa trezoro de la Jarlibro ankaŭ rete. Krom facila uzebleco por rapida serĉo de delegitoj k.a. informoj, avantaĝo de la reta Jarlibro estas ĝia ĝisdateco. Pere de la reta Jarlibro eblas krome sendi retmesaĝojn al delegitoj kaj akiri por si plusendan retadreson kun la finaĵo <@uea.org>. Uzantoj de la reta Jarlibro, kies kotizo rajtigas ricevi la revuojn "Esperanto" aŭ/kaj "Kontakto", povas legi ilin rete kaj daŭre disponi pri la antaŭaj numeroj ekde la jarkolekto 2004. Por ekuzi la servon necesas registriĝi ĉe <http://reto.uea.org>, alirebla ankaŭ per la ligilo "Jarlibro" sur la startpaĝo de <www.uea.org>. Meze de junio tiu ĉi servo, enkondukita en aprilo 2005, havis 1450 uzantojn. En sia antaŭparolo Renato Corsetti dankas la kreinton de la reta Jarlibro: "... mi kredas ke Hector Hodler en la transmondo estas aparte fiera pri Andrej Grigorjevskij, kiu realigis la Retan Jarlibron, kaj pri UEA, kiu komisiis la realigon."

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2007

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Aĥmetova Faina (Ivanovo), Kononenko Jevgenij (Toljatti), Sidorova N. (Perma reg.), Sudakova Aleksandra (Dimitrovgrad)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva EK-MASI (+12 novaj membroj): *Beljaeva Jekaterina, Borisova Jelena, Ĉerjomin Roman, Ĉerjomina Ljubovj, Kastra Alina, Senjakin Konstantin, Senjak-*

ina Tatjana, Spolvind Dmitrij, Stepanov Andrej, Ŝaligina Marija, Truŝin Aleksandr, Vibornova Anna

Sankt-Peterburga E-Societo "Espero" (+3 novaj membroj): *Celinskij Andrej, Luckaja Tamara, Teluĥ Dmitrij*

Uljanovska E-klubo (5 membroj, unu nomo estas dume ne konata): *Abramov Sergej, Karceva Margarita, Karceva Marija, Sjabukova Olga*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>.

KOTIZOJ DE REU POR 2007

Individua kotizo – 80 rubloj (por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por loĝantoj de aliaj landoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por loĝantoj de aliaj landoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio sama kiel por individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 150 rub. (ekster Rusio kaj KSŜ – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn REGo-abonpagojn sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Eksciu, ke...

"AMO KAJ KOLOMBOJ" – KAJ PRI ESPERANTO

La 28-an de julio la rusia televida kanalo "TV-centr" montris 40-minutan dokumentan filmon "Ljubovj i golubi 57-go" ("Amo kaj kolomboj de la 57-a"), dediĉitan al la 50-jara datreveno de la 6-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, okazinta en Moskvo en 1957.

Esperanto estis uzita kiel unu el ĉefaj simboloj de libera komunikado kaj internacia amikeco, kiuj regis dum tiu neimagebla por la tiama poststalinisma Sovetunio forumo. Esperanto plurfoje sonas fone, oni intervjuas malnovajn eistojn, kiuj partoprenis en la Festivalo, montras modernan E-lecionon, dum kiu oni legas tekston pri la Festivalo, la titolo "Amo kaj kolomboj" estas krete skribata sur la nigra tabulo.

Ne estas menciate, sed aldonindas, ke vasta E-movado renaskiĝis en Sovetunio ĝuste dank' al la Festivalo – post 20 jaroj da severaj persekutoj. En la kvanto de 100 000 antaŭ la Festivalo estis eldonita la libreto de Andrejev pri Esperanto, multaj moskvaj studentoj eklernis E-on devige – por reprezenti Sovetunion dum la enprogramaj E-aranĝoj de la Festivalo, kaj tiel ekŝatis la lingvon kaj la ideon, ke ne ĉesis uzi ĝin ankaŭ poste.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

KOMUNA INSTRUISTA TREJNADO

La Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz kaj ILEI kune organizas internacian instruistan kursaron en Poznano (Pollando), kiu disponigos la bazajn konojn, necesajn por instruado de Esperanto, kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka semajna sesio (la unua okazos 15-21.09.2007 kaj la dua 02-08.02.2008), intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kaj fina ekzameno okazos en septembro 2008. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista kursaro. (Tiuj kiuj partoprenos la kursaron enkadre de siaj trijaraj interlingvistikaj studoj, kiel specialiĝon, ricevos diplomon pri postdiplomaj interlingvistikaj studoj.) Kondiĉo: bona lingvoscio (atesto pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de Esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 360 eŭroj, B-landoj 125 eŭroj por unu semestro.

El la Programo:

Lingvopedagogio (Zsófia Kóródy, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Maria Majerczak): Bazaj faktoroj de lingvopedagogio, Esperanta metodiko, Instruhelpiloj (de instruista kofro ĝis retkursoj).

Esperanta kulturo (István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny): Plej gravaj eventoj de la historio de Esperanto, Ĉefaj periodoj de E-literaturo, Tiklaj punktoj de E-gramatiko, Lingva trejnado (per testoj).

Kiel donaco – partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj: Problemoj de la nuntempa E-movado (Humphrey Tonkin); Nuntempa literaturo (István Ertl); Psikologiaj aspektoj de komunikado (Claude Piron); Interkultura komunikado (Ilona Koutny).

Aliĝo ĉe: <ikoutny@amu.edu.pl>; d-rino Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj (Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan).

(Esperanto-rus-informoj)

DU EU-PARLAMENTANOJ EN KONGRESO DE EEU



Inter la 28-a de julio kaj 4-a de aŭgusto okazis la 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor, Slovenio. Partoprenis 256 personoj el 29 landoj (23 eŭropuniaj plus Kroatio, Serbio, Rusio, Ukrainio, Kanado kaj Togolando). Dum la fermo la prezidanto de EEU Seán Ò Riain diris, ke la kongreso plenis je unuafojaj unikaĵoj. Unuafoje partoprenis en Esperanto-aranĝo eĉ du anoj de Eŭropa Parlamento: Małgorzata Handzlik (Pollando) kaj Ljudmila Novak (Slovenio). Unuafoje parton de Esperanto-kongreso kunfinancis Eŭropa Komisiono, ĉar parto de la kongreso estis konferenco kun la titolo "Interkultura dialogo kaj komunikado", en kiu prelegis dek fakuloj, kiujn aŭskultis mezume po cent personoj. Krome laŭ li unuafoje ĝenerala Esperanto-kongreso havis ĉeftemon, kiu ne rilatis al lingvo kaj kulturo, sed al rekte ekologia temo: "Akvo".

(libera folio)

PAŬLO MOĴAJEV – NOVA REDAKTORO DE "KONTAKTO"

Per komuna decido de la estraroj de TEJO kaj UEA Pavel (Paŭlo) N. Moĵajev el Ukrainio transprenos de Ĵenja Amis la redaktorecon de "Kontakto". Ĵenja Amis estas redaktoro de la socikultura revuo de TEJO ekde 2002. Post pli ol kvinjara sukcesa kaj multe laŭdata laborado ŝi laŭgrade transdonos la respondecon al sia posteulo ĉi-jare.

Paŭlo Moĵajev naskiĝis en 1981 kaj diplomiĝis en 2003 en la Krimea Ŝtata Medicina Universitato en Simferopolo, kie li nun estas instruisto pri anatomio. Kun Esperanto li konatiĝis en 2000 kaj ekde tiam aktive partoprenas la landan movadon. Ekde 2003 li okupiĝas pri provlegado de "Kontakto", kies redaktoron li pas-

intjare ekhelpis kiel vicredaktoro. Partoprenantoj de pluraj Esperanto-aranĝoj povis ekkoni ankaŭ liajn muzikajn talentojn; ekz. en IJK-oj en 2004 kaj 2005 li koncertis prezentante proprajn kantojn. Moĵajev estas ankaŭ aktiva Esperanto-instruisto kaj diplomiĝis pri la Cseh-metodo. Li verkas, tradukas kaj lastatempe laboras ankaŭ super Esperanta-rusa vortaro.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

JOHANO RAPLEY FORPASIS

La 9-an de junio, nur dek tagojn antaŭ sia 80-jariĝo, forpasis John (Johano) Rapley (1927-2007). Li estis la lasta direktoro de la Centra Oficejo de UEA en la vilaĝo Heronsgate apud Londono. Esperantisto de 1944, li eklaboris en CO en 1951 kaj estis ĝia direktoro de 1954 ĝis 1955, kiam CO translokiĝis al Roterdamo. Post longa paŭzo Rapley laboris ankaŭ en la Roterdama oficejo kiel librotenisto en du periodoj, 1983-1986 kaj 1990-1992. Vivante ankoraŭ en Londono li aktivis en la Londona Esperanto-Klubo, kies honora vicprezidanto li fariĝis, kaj kiel peranto de SAT. Laste Rapley kaj la edzino Helga vivis en Francio, i.a. kelkajn jarojn en La Kvinpetalo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

ESPERANTO-HOTELO EN BULGARIO



En Bulgario denove estas Esperanto-hotelo, en kiu povas ripozi geesperantistoj el la tuta mondo. En la hotelo okazados Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, internaciaj Esperanto-konferencoj kaj seminarioj, konversaciaj rondoj, kursoj pri originala Esperanto-literaturo kaj historio de Esperanto-movado, renkontiĝoj kun famaj Esperanto-verkistoj kaj sciencistoj, ekskursoj tra la pitoreska bordo de la Nigra Maro.

La nomo de la hotelo estas ***Diana,*** kaj ĝi situas sur la alloga bordo de Nigra Maro, nur je 9 kilometroj for de la fama bulgara mara urbo Burgas. La eleganta hotelo estas je 100 metroj for de la belega plaĝo, kies ora sablo logas ripozantojn el la tuta mondo. En la hotelo estas komfortaj du- kaj trilitaj ĉambroj, en kiuj estas moderna banejo, televidilo, fridujo kaj ĉio necesa por agrabla ripozo.

Por la geesperantistoj el diversaj eŭropaj landoj estas rabato. De la 1-a de junio ĝis la 15-a de julio dulita ĉambro kostas nur 20 eŭrojn. De la 15-a de julio ĝis la 15 de septembro dulita ĉambro kostas nur 25 eŭrojn.

La adreso de la hotelo estas: *urbo Burgas, kv. Krajmorie, str. Ĉernomorka 9*; retadreso: <*modest@abv.bg*>.

GRANDEGA RETEJO PRI ĈUVAŜIO

Dank' al la ĉionscia *Google* mi trovis, ke "Ĉuvaŝia popola retejo" ĉe <http://chuvash.org> posedas ankaŭ E-version – kaj en tiu versio oni trovas tradukita la tutan ampleksan informaron de la retejo – pri la respubliko, pri la historio, kulturo ktp. Strangas, ke mem loĝante en Ĉuvaŝio, mi neniam aŭdis pri tiu grandega laboro – efektivigita ĉefe de Sergej Tiĥonov fine de 2006.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

NOVTIPAJ ESPERANTO-EKZAMENOJ PREPARATAJ

Konforme al la novaj lingvotestaj normoj de la Konsilio de Eŭropo la ekzamena laborgrupo de UEA kaj ILEI estas ellaboranta novan ekzamensistemon, kiu ebligos al la esperantistaro trapasi internaciajn ekzamenojn je tri niveloj A, B kaj C. La novtipajn atestojn pri lingvokono pli kaj pli ofte jam postulas dungantoj kaj edukinstitutoj ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj de la mondo. La ekuzo de unueca normaro en Esperanto-ekzamenoj ebligas taksi lingvajn lertojn laŭ samaj kriterioj en kaj ekster Esperantujo, kompare kun ajna nacia lingvo. (Pli da informoj troviĝas en la sekcio Referenckadro en <www.edukado.net>.)

La testado de la novtipaj ekzamenoj finiĝos en tiu ĉi jaro, kaj la nova ekzamensistemo povos ekfunkcii en 2008. La malnovaj ekzamenoj de UEA-ILEI dume plu estos okazigataj laŭ la malnova strukturo, t.e. en du niveloj. Estas konsilinde trapasi ilin, kiam oni bezonas ateston por propra celo aŭ nur ene de la movado. Pri la Referenckadro, taksaj normoj kaj la novtipaj ekzamenoj okazos prezentoj dum la Tago de Lernejo en la UK en Jokohamo. UEA kaj ILEI alvokas siajn landajn asociojn kaj sekciojn akiri kaj studi la broŝuron "La Komuna Eŭropa Referenckadro", eldonita de UEA ĉi-jare, kaj laŭ ĝi komenci adapti siajn enlandajn instru- kaj ekzamensistemojn. Por pliaj informoj kaj klarigoj oni kontaktu la vicprezidanton de ILEI, Zsofia Korody, <esperanto-zentrum@web.de>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Kruko kaj Baniko aranĝis ke aviadisto flugigu ilin al Kanado por ĉasi alkojn. Ili sukcesis pafmortigi 6. Dum ili ŝarĝas la aviadilon por reveni hejmen, la aviadisto diras ke la aviadilo povas porti nur 4 alkojn.

La ĉasistoj forte kontraŭas tion:

– Pasintjare ni kaptis ses. La aviadisto permesis ke ni portu ĉiujn, kaj lia aviadilo estis la sama kiel la via.

Malentuziasme, la aviadisto cedis, kaj ĉiuj ses alkoj estis ŝarĝitaj en la aviadilon. Tamen, eĉ uzante sian tutan potencon, la eta aviadilo ne eltenis la ŝarĝon kaj falis.

Iel, ĉirkaŭitaj per la korpoj de alkoj, Kruko kaj Baniko postvivis la frakason. Elrampinte el la frakasaĵo, Kruko demandis al sia amiko:

– Ĉu vi havas ian ideon, kie ni troviĝas?

Baniko respondis:

– Mi pensas ke ni estas sufiĉe proksimaj al la loko, kie ni frakasiĝis pasintjare.

(esperanto-anekdotoj)

LAŬREATOJ DE "MUZO-2007"

La 20-an de julio dum Baltiaj Esperanto Tagoj-43 en Šiauliai okazis belartaj konkursoj "Muzo-2007". Jen estas la laŭreatoj:

Poezio originala:

1. Ne aljuĝita
2. Christian Riviere (Francio)
3. Dimitrije Janicic (Serbio) kaj Christian Riviere (Francio)

Prozo originala:

1. Zorka Vinceljak (Kroatio)
2. Tim Westower (Usono)
3. Lenke Szasz (Rumanio)

Fotoj:

1. Edit Oroszne Szasz (Hungario)
2. Lenke Szasz (Rumanio) kaj Edit Oroszne Szasz (Hungario)
3. Alfreds Gegermanis (Latvio)

Deklamado:

1. Inita Tamošiuniene (Litovio)
2. Nora Caragea (Germanio)
3. Alfreds Gegermanis (Latvio)

(landa agado)

"TIELAS VIVO" – NOVA ALBUMO DE "KORE"

Depost la albumo "Kia Viv'", eldonita de Vinilkosmo en 2000, ni povintus pensi ke "Kore" registris sian lastan kaj ununuran verkon, sed tio estis sen kalkuli pri la vigla persistemo de la gvidanto kaj kantisto de la bando, Kris Spitzer, kiu tute ne perdis sian belegan voĉon, sed atingas, per ĉi tiu nova albumo, nivelon vere sublime elstaran!

La stilo kaj la muzikistoj ŝanĝiĝis, varmaj sonoj kun la gitaristo François Tijou, alinome Fiks, kontribuas al riĉigo de la bonega sono de "Tielas vivo", kie estas ankaŭ 6 titoloj ne eldonitaj dum la epoko de "Kia Viv'".

Kris kompreneble ankaŭ estas la aŭtoro de ĉiuj tekstoj en Esperanto, krom tiu el poemo de Sara Török; estas brila la adapto de Roel Haveman de la fama “The show must go on” de la legenda bando “Queen” kun muzikaranĝoj de la bretona muzikgrupo Tri Yan.

Krom la 17 titoloj, vi trovos en la disko dulingvan version (Esperanto-francan) laŭ MP3-formato de “Promeso via”, 5-minutan videofilmeton en MPEG kaj 15 titolojn laŭ karaokea versio ankaŭ en MP3. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi, vizitu <http://www.vinilkosmo.com//?disc=vkkd88&lng=e>.

(Vinilkosmo)

THORSEN-APOGO JE DISPONO DE BIBLIOTEKOJ

Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon pligrandigi siajn kolektojn, ĉar ankaŭ ĉi-jare UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. Subvencion oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare sep bibliotekoj ricevis subvenciojn je la valoro de 75 ĝis 250 eŭroj. La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2007. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin rete al <direktoro@co.uea.org>. Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bonhavon de la Biblioteka Apogo, eblas konatiĝi per la retejo <www.poulthorsen.dk>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

PRI KVIN RUSLINGVAJ LIBROJ

Dum lastaj jaroj en Ruslando aperis ruslingvaj libroj kun mencioj pri Esperanto aŭ esperantistoj. Sur mia skribotablo kuŝas kvin libroj, kiujn mi volas komenti speciale por ruslandanoj.

La unua estas “**Istorija lingvistiĉeskiĥ uĉenij**” de Nikolaj A.Kondraŝov (“La historio de la lingvistikaj skoloj”), *Moskvo, Helpinstrulibro, stereotipa 3-a eld., 2006, – 224 p., eldonkvanto ne indikita, ilustrita.*

En la tria ĉapitro “La lingvoscienco en Mezepoko kaj Renesanco” en § 19 “La provoj kaj projektoj de la kreado de internaciaj lingvoj” la aŭtoro mencias Esperanton, sed prezentas malverajn ciferojn. Ekzemple, laŭ la teksto:

“La esperantistoj asertas, ke da ili nuntempe oni kalkulas pli ol 7 milionojn. En la lingvo aperas ĝis cento da revuoj, estas kreita multspeca literaturo (ĉirkaŭ 7 mil libroj), prezentita precipe per tradukitaj verkoj de beletra literaturo, inkluzive konsiderindajn ĉefverkojn de la mondliteraturo, estas eldonataj instruhelpiloj de la lingvo kaj la vortaroj.

La originala literaturo en Esperanto, evidente, ne havas estonton, ĉar ĝi estas pure praktika lingvo-peranto, sukcesinta ĉe kolektantoj, sportistoj, kuracistoj kaj parte filologoj”.

En la prezentita parto mi vidas 2 ciferojn havantaj kun la realo nenion ko-

munan. Konsiderante la ciferojn ni ricevos la tristan bildon. Se dividi 7 000 000 legantoj al 7 000 libroj rezultos, ke por aĉeti 1 libron estas vico el 1 000 legantoj. *(Tamen 7000 estas, verŝajne, la kvanto de titoloj, sed ne de unuopaj ekzempleroj. – Red.)* Sed tio ne estas vero. Mi en mia kolekto havas pli ol 200 librojn. Ĉiutage mi legas la librojn, sed ne vidas la vicon. Kie do estas vero? En la ora mezo.

Unue pri la kvanto de la esperantistoj. Ne ekzistas precizaj ciferoj, ĉar neniu ŝtato faris oficialan kalkulon. Ekzistas diversaj taksoj, kaj ne nur la ĵurnalistoj uzas la proksimumajn ciferojn, sed spekulacias per nebulaj onidiroj. Estas modesta takso pri 300 miloj da esperantistoj.

Due pri la libra kvanto. Ankaŭ la librojn neniu kalkulis. En mondfamaj E-bibliotekoj estas gardataj miloj da E-libroj: en la Internacia E-Muzeo en Vieno (Aŭstrio) estas 25 000 libroj; en E-Fondaĵo Kortrijk (Belgio) – 10 000; en la Biblioteko Montagu (Britio) – ĉ. 10 000; en Hispana E-Muzeo (Hispanio) – 8 400; en la Nacia E-Biblioteko kaj Arkivo (Italio) – 7 250; en la Biblioteko de Japana E-Instituto (Japanio) – ĉ. 20 000; en E-Kolektaĵo Fajszi (Hungario) – 11 292 libroj kaj dokumentoj; en la Biblioteko Hector Hodler de UEA (Nederlando) – pli ol 20 000 bibliografiaj unuoj. Se konsideri unue, ke en la bibliotekoj estas samtitolaj kaj malsamtitolaj libroj, kaj due, ke ne ĉiuj iam eldonitaj E-libroj havas siajn lokojn en la bibliotekoj, ni konkludas ke en la E-mondo ekzistas ĉ. 30-35 mil libroj. Do nun ni ricevis pli-malpli ĝustajn ciferojn. Esperantistoj en la mondo estas 300 miloj, ili disponas 35 mil librojn. Averaĝe ni vidas vicon el 10 legantoj por 1 libro.

Trie, estas stranga la konkludo ke Esperanto ne havos estonton, ĉar ĝi havis sukceson nur ĉe la 4 menciitaj grupoj. La Jarlibro de UEA informas pri 80 fakaj kaj amatoraj asocioj. La menciitaj grupoj de E-uzantoj estas ne solaj inter 80 societoj.

> Nokte policisto haltigas ebriulon:
> – Kien vi iras?
> – Mi estas aŭskultonta prelegon pri la malutilo de drinkado.
> – Ha, ĉu iu prelegas nokte?
> – Jes ja! Miaj edzino kaj bopatrino…
>
> ***(per-esperanto-humuro)***

La dua libro estas “**Istorija odnogo mifa: Marr i marrizm**” de Vladimir M.Alpatov (“Historio de unu mito: Marr kaj marrismo”), *Moskvo, 2-a kompletigita eld., 2004, – 288 p., eldonkvanto 960 ekz.*

La tuta enhavo de la libro priskribas unusolan personon, nome Nikolaj Marr (1864-1934). La aŭtoro bonege posedas la temon, ĉar li priskribas la vivon kaj agadon de akademiano Marr ekde lia naskiĝo kaj morto ĝis la frakaso de la mito, kiun famigis liaj disĉiploj dum 30 jaroj. La lastan baton en la misfamigo de la akademiano faris Stalin mem. Sur la paĝoj de la oficiala landa presorgano “Pravda” li iniciatis disputon, el kio rezultis la fino de la mita famo de Marr. En la libro la aŭtoro mencias pri grupo de junaj lingvistoj de “Jazikfront”, inter ili oni vidas la nomon de E.K.Drezen. Ankaŭ en la libro estas menciitaj esperantistoj L.Ŝĉerba, J.Polivanov, L.Vigotskij, J.Loja, L.Ĵirkov.

La tria libro estas: “**Furŝtatskaja ulica**” de Arsenij S. Dubin (“La Furŝtata strato”), *Moskvo – Sankt-Peterburg, 2005, – 430 p., eldonkvanto – 4000 ekz., ilustrita.*

La libron verkis la malnova kaj maljuna peterburga esperantisto Arsenij Dubin. En la libro sur la paĝoj 83-84 estas mencio, ke en la domo № 21 de la peterburga strato laboris S.N.Podkaminer, ankaŭ maljuna kaj malnova esperantisto. Post ducent paĝoj estas teksto pri E-societo "Espero", oficiale registrita en 1892, kaj pri E-movado entute.

La kvara libro estas: "**Oĥotniki na ŝpionov. Kontrrazvedka Rossijskoj imperii 1903-1914**" de Boris A.Starkov, ("Ĉasistoj je spionoj. Kontraŭspiona servo de la Ruslanda imperio dum 1903-1914"), *Moskvo, 2006, – 304 p., eldonkvanto – 4000 ekz.*

En la dua parto de la libro en la 1-a ĉapitro "Armea reformo kaj aranĝo de la kontraŭspiona servo" en paĝoj 182-184 estas fragmento "Spiona laboro de la barono de Ungern-Ŝternberg kaj kapitano Postnikov". Pri ambaŭ personoj oni povas legi en alia libro originale en Esperanto verkita de Mikaelo Bronŝtejn kaj tradukita rusen fare de A.Radajev.

Temas pri la kvina verko: "**Desjatj dnej kapitana Postnikova**" ("Dek tagoj de kapitano Postnikov"), *Moskvo, 2007, – 368 p., eldonkvanto 500 ekz.*

Pri la libro jam estas recenzo de Marie France Conde-Rey: "Jen la brava, juna, ĉarmega oficiro Postnikov, kiu, en la tempo de niaj pioniroj, gvidis la rusan E-movadon. Eniru en lian vivon, liajn revojn, liajn renkontojn, dum la krozado al Ameriko por la Vaŝingtona Universala Kongreso. Dank' al kunmetado de tre diversaj dokumentoj, spektu la maturiĝon de nia Historio. Vidu kiel kunagas la noblaj streboj kaj la bazaj impulsoj. Aŭskultu la saĝajn parolojn de Zamenhof, kiujn post jarcento ni ankoraŭ ne funde enlumiĝis. Kaj se foje la rakonto amare ĝustas, tamen je la fino ni kapablos danki tiujn tiom sincerajn praesperantistojn".

Anatolo Sidorov (Sankt-Peterburg)

LEGENDA KLASIKAĴO ESTAS DENOVE HAVEBLA

Unu el la plej famaj Esperanto-libroj, "Vivo de Zamenhof", estas denove havebla. Sojle de la Jokohama UK aperis ĉe UEA la sesa eldono de tiu ĉi verko, unue eldonita en 1920, nur tri jarojn post la forpaso de Lazaro Zamenhof (1859-1917). Verkis ĝin la sviso Edmond Privat (1889-1962). Li estis la unua, kiu, krom priskribi la vivon de Zamenhof, ankaŭ malkaŝis liajn verajn motivojn por la kreo de Esperanto.

La libro de Privat jam delonge estas konsiderata klasikaĵo. Aperis de ĝi tradukoj en ok naciajn lingvojn. La nunan eldonon redaktis Ulrich Lins. La redaktoro zorge kontrolis ĉiujn citaĵojn el paroladoj kaj verkoj de Zamenhof surbaze de "Plena verkaro de L.L.Zamenhof" de Ludovikito. En la ampleksaj notoj troviĝas font-indikoj kaj aldonaj klarigoj. La nova eldono estas pli abunde ilustrita, ankaŭ per multaj malpli konataj fotoj. Sekve la libro ne estas nur reeldono sed posedas nun tute novan kvaliton. Sendube, multaj novaj legantoj kaptos la ŝancon konatiĝi kun la verko de Edmond Privat, kiu en rava stilo proksimigas al ni la vivon, kreadon kaj ideojn de Zamenhof. Samtempe ĝi estas ĵurnalisme viveca enkonduko en la pioniran periodon de Esperanto.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Mikaelo Bronŝtejn

Al …

Ni ne estimas unu la alian,
kaj por ĉikan' do
vi uzas ĉiun ajn mispaŝon mian
sen ĝena rando.

Moralo via elasteca, guma
permesas venon
de la kondut' esence sencerbuma,
kaj la venenon
de l' vortoj – foje stultaj, foje trafaj –
vi sputas ĉie,
kirlante kun mensogoj okulfrapaj
senemocie.

Ne diru mi, ke vi min ne molestas –
ne estas vero –
ia incit' enkape tamen restas
por sur papero
respondi ne per reciproka sakro,
sed nur per nova
humura strof', senmoka mokversaro
aŭ ŝerc' bontrova.

Post jaroj eble trovos vi sen pen', ke
via agado
vin gvidis en la vivo ekstervenke
laŭ misa pado,
kaj ke l' aprezon pli imponan, certe,
fortunajn dotojn,
vi havus, se kupletojn kantus lerte
aŭ flikus botojn.

Ho, tamen ne! Plu faru kion faras –
impete, verve!
Ke vi inspiras min – por mi ja klaras,
nur iom nerve.
Eĉ se en mia kor' sen min obei
malico nestus –
sendube ja mi vin devintus krei,
se vi forestus.

okt. 2006

* * *

Printempo! Kie vi?!
Frost' furiozas martkomence,
Kaj neĝo, neĝo plenpotence
Plu mastras sur teritori'
De mia vok', de mia kri':
– Printempo! Kie vi?!!!
Ekfeblas eĉ kriega krio.
Ĉe l' horizont' reeĥas io –
Ekspir', ekĝem', ekplor' – vizi'
Por la inflama fantazi'.
– Printempo! Kie vi?!
Tusad' postkria, nerva vibro,
Preskaŭ perdita ekvilibro
Inter toler' kaj agoni',
De pacienc' al tragedi'…
– Printempo! Kie vi?!
Ekruĝ' de horizonta alo
Certigas: ne okazos falo,
Fatala febra incitem'
Degelos, krevos per si mem –
Kaj venos la printemp'!

02.03.2007

Pluva bluso

Mi estas for
de prudentaj decidoj pri ia ekag',
Vanuas el kor'
la deziro kompreni, ke daŭras la tag',
kaj vea venen'
plenigas bobele pokalon de l' sort',
kaj sonas en splen'
senpasia despero de blusa akord'.

Revenu vi home, vizie, fantome,
Revenu en tuto eĉ nur por minuto
Kaj restu kun mi!
Amata senfine, plej ĉarma virine –
En festoj, en plagoj, dum noktoj, dum tagoj
Delekto por trista anim'…

Fluas la pluv',
Gutoj lense grandigas ombregojn de l' nokt' –
Jen estas la pruv',

Ke ne lasos min jam la kutima sufok'
De larma real' –
Same lense en larmoj grandiĝas vizi' –
Ebriiga fatal'
Tute dronas en bluso kun penso pri vi.

Aperu senbrue, mirakle kaj flue
Sur nuba podio por la melodio,
Por blusa paŝad'.
Al rev' efemera, glimante malvera,
Loganta nin fore, tentanta amore
Nin blusas la pad'…

Cedas mallum' –
Nuban tukon je flikoj disŝiris la vent',
Telere la lun'
Ŝvebas inter la flikoj de mia prudent',
Kaj kreas gitar'
Purajn sonojn post sombre sopira obtuz'.
Trankviliĝas mi, ĉar,
Eĉ se vi ne revenos, plu daŭros la blus'.

novembro-06 – marto-07

Pri la 3-a eldono de "Legendoj pri SEJM"

Sendube, eĉ se kelknuance subtilaj,
La novaj "Legendoj" ja ŝajnis utilaj
Almenaŭ al mi, la aŭtor' nemodesta,
Ĉar min impetigis la Into honesta.

Post kiam cent homoj ĝin legis, ktp,
Jam samopinias almenaŭ triopo,
Sendinta flataĵojn, sed ne sen kritikoj.
Respondu mi nun: – Koran dankon, amikoj!

Ho ve! Senhezite forrajdas la tempo:
Mi, kun la natura sincer' kaj sentem', po
Dek rubloj vendata en falso ekrana,
Ja ŝajnas person' absolute lontana
De l' nuna epoko, de l' juna medio,
Malmoda. Sed plu konvinkita pri tio,
Ke nin la juneco ne vane ekzaltis,
Ke l' baroj obstinaj ja iom dissaltis
Per nia fervoro kaj nia espero.

Nu, eble, ne vane nin tenis la Tero,

Kaj la juna gent', krom la lingva belego,
Ricevas ĉi libron por hasta tralego –
Sen duraj ordonoj, kun nur rekomendoj
Alude humilaj – ja estas legendoj…

05.06.06

Al la aŭtuno

Bonan vesperon, nova aŭtun',
rufharulino!
Haŭton karesas milda tuŝet'
De via spiro,
Kaj estingiĝas tinta latun'
Ĉe l' taga fino,
Kaj ekruĝiĝas lanta kviet'
De sunsubiro.

Ni, aŭtunaj, ne plu junaj
Amas tarde eĉ pli arde,
Kronoj brulas, vento lulas
En karesa flu'.
Longas tempo ĝis printempo
Do en nuno ni, aŭtuno,
Kune spiru, kune iru,
Kune amu plu.

Bonan vesperon, nova aŭtun',
mia bonkora!
Mi vin invitis, mi en kamen'
Fajron bruligis.
Dancas en vinoj de mia jun'
La luno ora,
Senpacience gvatas seren',
Kiu nin ligis.

Venu festa, en majesta
Ora pelto via svelto
Vokas loge – jen apoge
Estu mia brak'.
Kun surprizo – vangokiso
Ne laŭmende, senpretende
Ĝena honto, ĝoja ondo
Por la kuna vag'.

Bonan vesperon, nova aŭtun',
Min ekreganta!

Mil melodiojn pentras vi per
Bunta naivo.
Do mia mondo iĝas de nun
Paca kaj kanta
Post forbrulinta brua somer'
De mia vivo.

Ni ĉelune kantu kune,
Lumrivero en aero
Akve lirlas, sonojn kirlas
Pura melodi'.
Tagoj kuraj – revoj nuraj,
Luma falo en realo,
Kaj al disto – dolĉo, tristo –
Kune iras ni.

sept. 2006

Montrante familian albumon al la gasto-oficiro

Ĉu vin kaptas ia tristo tenera,
ne, ne amo, – estas io alia,
kiam montras vi ĉe lampo vespera
flavajn fotojn en album' familia?

Min ja jes. Jen mia avo – sen mon', do
idojn tamen produktinta kun fajno:
sep gefiloj liaj venis en mondon!
... Ĉiuj sep suferis en militfajro.

La avinjo – jen, grizhara, en lito...
Jam malsana, jes, okdekjarulino.
En Taŝkent' ŝi restis dum la milito
por priplori kaj atendi. Ĝis fino.

Tiu estas la plej aĝa onklino,
kiel panjo – belvizaĝa kaj svelta...
La unuan trovis ŝin la mortfino
En fornego de l' horora Oswiecim.

Jen aliaj tri – tre ĉarmaj, endance...
Dum bombado teren falis, vunditaj.
Inter ili – mia panjo. Bonŝance
nur brultuŝis ilin fajroj militaj.

Plej bonŝance ja por mia patrino,
ĉar hazarde, inter sanga homkaĉo

la knabinojn trenis for, al ravino,
brulvundita viro, jen, do – la paĉjo.

Tiu dando? Jes, la onkl'. Ne en banko.
Li spertiĝis pri labor' kun juveloj...
Sed forbrulis batalante, en tanko,
dum kolegoj zorgis pri siaj feloj.

Honorigon lian por batalardo,
por glorago, heroaĵo kulmina, –
la ordenon de la Ruĝa Standardo
prenis panjo nur en la sesdek kvina.

Jen alia – fortegul', kiel bovo!
Forĝis feron li, hufumis ĉevalojn...
perdis brakon apud fora Ĥarkovo,
sed ricevis (vidu jen!) du medalojn.

Jen la lasta – prudentulo diketa,
kolonelo, ĝisirinta Berlinon,
eksigita pro l' ordono hebeta
postmilite. Kaj pafinta la sinon.

Ruĝa sun' subiras nuben kun vento –
morgaŭ, eble, ne tre bonos vetero...
Mi, naskita post kaj dank' al la Venko,
kvazaŭ vidis la militon en vero.

Mi malamas ĝin... Ja multaj la saman
sorton havis, ankaŭ la familion...
Jes, vi estas militisto, kaj tamen –
ĉu vi volas ke mi ŝatu militon?

2006

* * *

Ne decidu rapide
ĉe l' bezon' de kompren'.
Tenas nin vid-al-vide
senhezita maten'.
Vortoj ŝajne konvinkaj,
enokula glaci',
sed komprenas mi vin, kaj
restas ŝanco por ni.

Kial ne enrigardi
al la ĉea pasint',
ne ekardi, sed gardi

helon en nia sin' ?
Vivoir' ne facilas,
sed ĉu estas problem' ?–
Kvereleto similas
al ombret' de ni mem.

Ni ne fidas nin, sed ne
malpermesas prudent'
flegi l' pensojn obsede
pri la verda ĝarden',
kie ni man-en-mane
ĝuis belon de l' ter'…
Kaj certiĝi, ke vane
venis tiu koler'.

ie en 2007

La instruistino ekzamenis la infanojn de sia klaso pri religio por konstati ĉu ili komprenis la koncepton pri atingo de Ĉielo.

Ŝi demandis al ili:

– Se mi vendus mian domon kaj mian aŭton kaj fordonus la tutan monon al la eklezio, ĉu tio atingigos min en Ĉielon?

– Ne! – respondis la infanoj.

– Se mi purigus la preĝejon ĉiutage, tondus la gazonon kaj konservus ĉion bonorde, ĉu tio atingigos min en Ĉielon?

– Ne! – denove respondis la infanoj.

– Nu, se mi estus afabla al bestoj kaj donus dolĉaĵojn al ĉiuj infanoj, kaj mi amus mian edzon, ĉu tio atingigos min en Ĉielon?

– Ne! – denove respondis la infanoj.

– Nu, infanoj, – ŝi daŭrigis, – kiel do mi atingu Ĉielon?

Sesjara knabo kriegis:

– Vi devas esti mortinta!

(esperanto-anekdotoj)